

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2016

Vendredon la 29an de januaro

64a jaro

Kalendaro

Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Mardo la 2a de februaro (sem. 5) – *tirsdag*

Volapük: Ripeto de la temo last- *Volapük: reprise fra januar 2015.*
januara.

Lundo la 15a de februaro (sem. 7) – *mandag*

Leif Arne Storset: Kial *bitcoin* estas *Leif Arne Storset: Hvorfor bitcoin*
tute nova speco de mono, kaj *er en helt ny slags penger, og*
samtempe la plej malnova speco. *samtidig den eldste.*

Mardo la 1a de marto (sem. 9) – *tirsdag*

JARKUNVENO. Vd. p. 3-4 *ÅRSMØTE. Se s. 3-4.*

Lundo la 21a de marto (sem. 12) – *mandag*

Matias Jentoft demonstras ludon. *Matias Jentoft viser et spill.*

OKAZIS

Ensociigo de rifuĝintoj (19.10)

Kiel prirapidigi ensociigon de rifuĝintoj? Ili devas atendi en rifuĝopetantejoj dum monatoj, eĉ jaroj, sen sencohava laboro aŭ ekz-e lingvokurso. Recepto por psika sufero kaj konfliktofarado! Valorus kaj indus investi multe pli en aktivigaj iniciatoj kaj kultura agado, i.a. lingvokursoj. Ilustre ni

aŭdis ankaŭ pri kelkaj individuaj sortoj.

UN: ĉu papera tigro? (3.11)

El la studkajero *Subtekste* (1998) kun sepdeko da artikoloj el *Monato* ni elektis *Papera tigro* (1994), de Stefan Maul, pri UN. La temo eĉ pli aktualas hodiaŭ ol tiam, nun post la (ne)intervenoj en

Srebrenica, Irako, Libio kaj Sirio. Malfacilegas konservi pacon, tamen UN pli sukcesis sur la kampoj de homaj rajtoj.

Duolingo: furora kurso (16.11)

Matias Jentoft per sia portebla komputilo montris al ni kiel funkcias la kurso en *Duolingo* por lerni Esperanton surbaze de la angla. Oni povas elekti inter subkursoj pri diversaj temoj aŭ pri gramatiko, kaj ĉio estas interaktiva: oni respondas al la ekzercoj elektante inter alternativoj kaj laŭ sia (mal)sukceso ricevas novajn taskojn. Sed same kiel la aliaj kursoj de *Duolingo*, ankaŭ tiu pri Esperanto estas ne rektmetoda, sed traduka. Kiel klarigi kial ĝi tiel furoras? (pliaj tri mil sinregistrintoj en la lastaj du tagoj!) Eble simple ĉar lernantoj de aliaj lingvoj jam uzas *Duolingo*, kaj vidinte Esperanton tie, scivolis pri ĝi?

Ĉu seksisma lingvo? (1.12)

"Ĉu Esperanto estas seksisma lingvo?" estis demando al kiu Otto turnis sin per lingvistika aliro. Ĉiu lingvo enhavas opoziciojn, kie unu elemento estas markita, la alia ne. Problemigaj en Esperanto estas

precipe la tradicia uzado de "li" – aŭ ekz-e "frato" en la zamenhofa *Al la fratoj* – por indiki ankaŭ inojn, kaj la same tradicia uzado de *-in-*kun *-anto*, *-ulo* kaj *-isto*. Diversaj reformproponoj estas lanĉitaj, sed Esperanto havas jam establitan strukturon, kaj ni laŭeble konscie uzu tiun ilaron tia, kia ĝi estas, konkludis Otto.

Mallonge pri bonega libro (21.12)

Pro vizito de du interesatoj ni ne sekvis la anoncitan programon, krom mallonga prezento de la libro *Historio de Esperanto* (2005) de Aleksander Korĵenkov.

[Akvo en la kelo!] (5.1)

La anoncita programo ne povis efektiviĝi, ĉar ni malkovris akvon en la kelo kaj ĉiuj devis helpi ĉerpi dum du horoj.

La norvega monarĥio (18.1)

25-jare jubileas la norvega reĝo, sed ĉu ni bezonas la monarĥion? Ĝi estas anakronismo – maldemokratia postlasaĵo el la pratempo – tamen populara inter 66 % de la popolo, kaj pro tio la parlamentanoj ne kuraĝas voĉdoni por ĝia abolo, pro timo perdi subtenon en posta baloto.

Ĉu vi havas proponon de temo por prezento aŭ diskuto en estonta kunveno? Ĝi povas esti E-movada, lingva aŭ socia/ monda.

Vizitkartoj

La vizitkartoj (vd. *N.E-isto* 6/2015 p. 4) atendas vin en nia klubejo.

La nova *Esperanto-nytt* videblas interrete ĉe esperanto.no/e-nytt .
Pri ĝi legu en *Norvega Esperantisto* 4, p. 5 – 6 kaj n-ro 5, p. 3 kaj 4.

Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj kaj konferencoj donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto. Ofte jun(et)aj homoj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

Jarkunveno / Årsmøte, mardon / tirsdag 1. marto

Tagordo / Dagsorden

- | | |
|--|---|
| 1. Aprobo de la kunvoko | 1. Godkjennelse av innkallingen. |
| 2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto. | 2. Valg av møteleder og referent. |
| 3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retroŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.) | 3. Årsrapport (sendes ut med e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den). |
| 4. Jarkalkulo (same) | 4. Årsregnskap (sendes på samme måte) |
| 5. Ricevitaj proponoj*. | 5. Innkomne forslag*. |
| 6. Elekto de estraro*, revizoro kaj reprezentanto en la domkomisiono, ĉiuj kun anstatuanto(j). Ankaŭ de nova elekta komisiono. | 6. Valg av styre*, revisor og representant i huskomiteen – alle med vara – samt valgkomité. |

[Forts. neste side

Ŝtatutŝanĝoj. Cato Haugen liveris du proponojn (en la norvega):

1.

Styret består av minimum 3 medlemmer som fordeler oppgavene seg imellom. Årsmøtet velger styrets leder og minst to andre styremedlemmer.

La estraron konsistigu minimume 3 membroj kiuj disdonas la taskojn inter si. La jarkunveno elektas prezidanton kaj minimume du aliajn estraranojn.

Nuna teksto (ŝanĝita en 2013):

[§ 8] *Generalforsamlingen velger klubbens styre, som skal bestå av leder, sekretær, kasserer, inntil fire styremedlemmer og to varamedlemmer.*

La ĝenerala kunveno elektas la estraron de la klubo, kiu konsistu el prezidanto, sekretario, kasisto, ĝis kvar estraranoj kaj du anstataŭantoj.

2.

Styret skal benytte seg av de beste tekniske løsninger/metoder for å fremme kunnskap om esperanto og lette opplæringen av språket.

La estraro uzu la plej bonajn teknikajn solvojn/metodojn por antaŭenigi sciojn pri Esperanto kaj faciligi la lernadon de la lingvo.

Aliaj proponoj atingu la estraron tri semajnojn antaŭ la jarkunveno, do ĝis mardo la 9a de februaro (semajno 6).

* Vakas pluraj postenoj en la estraro. *Vi mangler folk til styret.*

Bv. sendi (sin)proponojn. *Send gjerne forslag – på deg selv eller andre.*

En la klubejo ...

En la klubejo ni havas grandan kolekton da **kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj**: *Heroldo, Sennaciulo, Literatura Foiro, Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

La klubo ankaŭ vendas librojn – lernolibrojn, vortarojn kaj beletron – kaj T-ĉemizojn kaj glumarkojn.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 6 al Sinsen.

Vd. pli detale interrete ĉe esperanto.no/oslo -> "vojklarigo".

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/Forbundet 0533 05 22870).